

PROGRAMO DE LA VENONTAJ SEMAJNOJ

- Marto 2008**
 5 José Pinto de Sousa, denove pri la landnomoj.
 12 Sen-tema kunveno. Vi proponu temon.
 19 Antaŭ Paska kunsido.
 26 Ne kunvenos (*Katolika Pasko dimanĉe 23/3*).
- Aprilo 2008**
 2 André Demarque pri neologismoj.
 9 Vi mem proponu temon.
 16 Barbara Poterucha kvizas pri Nederlando
 23 Demjanenko Kostjantin kaj Jana pri Ukrainio
 30 Ne kunvenos (*Ortodoksa Pasko 27/4, ĉieliro 1/5*).
- Majo 2008**
 7 André Demarque pri Van Gogh per poŝtmarkoj.
 14 Vi mem proponu temon.
 21 Vi mem proponu temon.
 28 Vi mem proponu temon.

KOTIZ-TABELO 2008

Nro	Kodo	Kategorio	Kotizo (EUR)	Rajtoj
ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO				
11	MEM	Membro de EBG	10	
12	MEM-R	Membro - junulo (ĝis 26-jara)	5	abono al "Aktuala" (organo de EBG) + partopreno en la vivon de la Grupo
13	MEM-S	Membro - pensiulo, senlaborul.	7	
14	FAK	Familia kunloĝanto	2	partopreno en la vivon de la Grupo
18	DVM	Dumviva membro de EBG	250	Membreco kaj "Aktuala" dum la tuta vivo
BELGAJ REGIONAJ ESPERANTO-ASOCIOJ				
21	APE	Membro de "Association pour l'espéranto" (valona)	14	Abono al "Esperanto en Marche" (parte franclingva)
22	FEL	Membro de Flandra Esperanto-Ligo (FEL)	25	Abono al "Horizontaal" (grandparte nederlandlingva)
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO				
31	SA	Simpla abonanto de "Esperanto"	37	Abono al "Esperanto", monata organo de UEA
32	Kto	Simpla abonanto de "Kontakto"	23	Abono al "Kontakto", junulara revuo de UEA
33	MJ	Membro de UEA kun "Jarlibro"	23	Membreco en UEA + "Jarlibro"
34	MA	Membro-abonanto de UEA	58	MJ + SA + Kto (se junulo) + rabato !
35	MG	Membro de UEA kun "Gvidlibro"	9	Membreco en UEA + "Gvidlibro" (sen la adresaro de delegitoj)
36	SZ	Membro de Societo Zamenhof	116	Membreco en Societo Zamenhof (honora rondo de esperantistoj, finance subtenantaj UEAn)
37	MD	Dumviva Membro de UEA	1450	MA de UEA dum la tuta vivo!

**ESPERANTO**
aktuala

INFORMILO DUMONATA de la ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO
 Marto - Aprilo 2008
 Nova Serio N°2

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Claude Gladly, cglady@arcadis.be, Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0123048-52; Sekretario: Hélène Falk-Bracke, 7 Av. des Chênes, 1640 Rhode StGenese, informas +3223584214, helene.falk@skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (*tie nek poŝtkesto nek telefono*); Informoj: <http://users.belgacom.net/EBG> _ <http://ebg.skynetblogs.be> _ <http://uea.org> _ [www.esperanto.be](http://esperanto.be) _ www.esperanto.net _ www.omniglot.com/writing/esperanto.htm

ENHAVO

- Paĝo 2 - La paĝo de Hélène Falk-Bracke**
Paĝo 3 - Birdino pri sakraj konkurso
Paĝo 4 - Angelos raportas pri Parlamenta ekspozicio
Paĝo 5 - Probal Dasgupta en la 5a Azia Kongreso
Paĝo 6 - Kie esperantumi baldaŭ
Paĝo 10 - Pri Claude Piron
Paĝo 12 - Programo de semajnaj kunsidoj kaj kotiz-tabelo

LA PAĜO DE HÉLÈNE FALK-BRACKE

Pri Kosmografio

2008 estos SUPERJARO ! Tio signifas ke ĝi ampleksos 366 tagojn.

Ĉu vi scias kiam okazis la unua superjaro en la eŭropa historio ?

Vi eble memoras ke 2000 estis superjaro (kiel 1600), sed ke 1900, 1800, 1700 estis normalaj jaroj enhavantaj 365 tagojn. Ni klarigos kial.

Nia kalendaro nomata gregoria, ĉar enkondukita de la Papo Gregorio la XIII-a en 1582, estas modifo de la julia kalendaro, enkondukita de la romia imperiestro Julio Cezaro. Tiutempe, la jaro komenciĝis je la 1a de marto kaj jam enhavis 12 monatojn, sed ĝia daŭro dependis de la bonvolo de la romiaj Pontifoj, kiuj uzis ĝin kiel rimedo de korupto.

La konsilanto de Julio Cezaro estis la greko Sozigeno, kiu kalkulis ke la vera jaro daŭras 365 tagojn kaj kvaronon. Pro tio, oni decidis aldoni tagon al la lasta monato de la jaro Februaro ĉiun kvaran jaron, en la jaro kies numero divideblas per 4.

Sed la vera jaro, t.e. la tempo dum kiu la Tero faras kompletan turniĝon ĉirkaŭ la Suno, estas iom pli mallonga : 365 tagoj, 5 horoj, 49 minutoj kaj kelkaj sekundoj. Post 4 jarcentoj, la julia kalendaro jam malfruis je 3 tagoj ! Ekde la Koncilio de Nicea (326), tiu problemo maltrankviligis la episkopojn ; finfine, la papo decidis fortranĉi 10 tagojn de la jaro 1582 : la tago kiu sekvis la jaŭdon 4an de oktobro estis la vendredo 15a de oktobro ; la jaroj kies numeroj divideblas per 4 estas superjaroj, sed por ke la jarcentaj jaroj estu superjaroj, necesas ke la cifero de la *centoj* estu dividebla per 4.

Tiel, oni ricevas akcepteblan kalendaron, kiu en iom pli ol 3.000 jaroj estos nur unu tagon tro longa.

Kelkaj rimarkoj :

1- de 2.000 jaroj, ni plu nomas la 9-an monaton 'sepa' (septembro) ktp. ĝis decembro, kiu tamen estas la dekdua monato !

2- la unua de januaro ne identas kun la vintra solstico sed kun la tago kiam la Romiaj Konsuloj komencis sian oficon !

3- En la tempo de Karolo la Granda (747-814), la jaro komenciĝis je Kristnasko. Konklude : en Eŭropo, dum jarcentoj, la jaro komenciĝis malsame en la diversaj Ŝtatoj !. Mi kredas ke, iam, ĝi komenciĝis ie je la 1-a de Aprilo, kiun oni ankoraŭ festas per ŝercoj rilate al fiŝoj !

Hélène Falk

Ĉefa fonto : *le Calendrier (Paul Couderc) P.U.F. – Que sais-je?*

MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE UEA PRI LA FORPASO DE CLAUDE PIRON

Estas grandega persona ŝoko por mi - kaj por multaj aliaj, kiuj bone konis Claude Piron. Li estis ege alirebla; estis unike varma lia amikeco; pro tio troviĝas multegaj inter ni, kiuj aparte akute sentas la perdon.

Forpasis ne nur giganto de la esperantista mondo, sed Honora Membro de la Asocio. Mi sendas al vi ĉi-sube la tekston de mesaĝo mia, kiun iu el ni, reprezentante la Asocion, persone laŭtleĝos dum la funebra ceremonio por Claude Piron.



Claude Piron estis inter la ege malmultaj esperantistoj, kiujn mi konis kiel referencajn personojn enkorpigantajn la lingvon mem. Tia kono por multaj baziĝis simple sur liaj verkoj. Sed mi havis la bonan ŝancon esti en tre longdaŭra koresponda rilato kun li. Ni komencis diskuti mian malnetan angligon de lia fama eseo pri tio, ĉu Esperanto fakte estas azia lingvo, kaj el tio rezultis priteoria dialogo.

Tamen mi ne tro okupiĝu nun pri mia propra aliro - ni ĉiuj, pere de liaj tekstoj kaj pli lastatempe pere de lia rete havebla voĉa produktaro, havis konon de lia profunda kapablo konkrete interesiĝi pri difinitaj homoj kaj aferoj kaj surbaze de tiu konkreta interesiĝo esprimi plej simple la plej profunde pripensitajn reagojn al tio, kion li perceptis. Aparte vastan konantaron havis Claude Piron pri tio, ke ankaŭ liaj krimromanoj esprimis same lucide liajn ideojn pri la homeco.

Piron ne nur en teorioj kaj romanoj sed en sia vivlonga praktikado prezentis al ni ĉiuj la arton percepte rilati al konkretaj personoj kaj pejzaĝoj, ŝanĝi sin mem per tiuj perceptoj, kaj distili la rezulton en simplan, konscie lingvan prezenton de sia aliĝo. En Piron, tiu arto kaj la "bona lingvo" Esperanto bezonis identan flegadon; en li, tiu arto fariĝis lia bona lingvo, lia lingvo strebanta esprimi la homan bonecon en la konstruado de kiel eble plej simplaj vojoj inter la bezonantoj de helpo kaj la eventualaj donontoj de tiu specifa helpo.

Li estis ĉe la pinto de sia kapablo donaci al ni ĉiuj la malavaran fluon de tiu unika spirito, kiun li kreis; kaj neniu el ni estis preta aŭdi la drastan novaĵon, ke li tiel abrupte forlasis nin. Ni estas en stato de ŝokiĝo, kaj bezonos longan tempon por kunmeti niajn sentojn por pli inde esprimi al li nian omaĝon. Dume, en la nomo de UEA, mi komunikas al lia familio kaj liaj aliaj plej intimaj kunuloj la funebrajn sentojn de la tuta asocianaro pri la forpaso de tiu Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio, krom miaj propraj kondolencoj pro la forpaso de persona amiko.

Probal Dasgupta

BIOGRAFIO DE CLAUDE PIRON

Svisa psikologo kun forta intereso pri lingvoj, diplomito de la Interpretista Lernejo de Geneva Universitato, Claude Piron (Namur, 1931) estis tradukisto en UN (Novjorko) de 1956 ĝis 1961 (francen el la angla, ĉina, hispana kaj rusa).

Li poste laboris ok jarojn en Monda Organizo pri Sano, i.a. en Orienta Azio kaj Afriko. Trejnita kiel psikanalizo kaj psikoterapiisto, li komencis praktiki psikoterapion en 1969 en la ĝeneva regiono (de 1999 en Gland, Svislando). Li instruis en la Psikologia kaj Edukscienca Fakulo de Geneva Universitato de 1973 ĝis emeritiĝo en 1994. Lia ĉefa nuna aktiveco, krom la psikoterapia praktikado, estas profesie trejni junajn psikoterapiistojn, per kontrolo de ilia laboro kaj partopreno en trejnaj seminarioj. Li ofte prelegas pri psikologiaj problemoj, ĉefe en rilato kun la spirita vivo, aŭ (malpli ofte) pri

internacia komunikado kaj Esperanto.

Lia verko "*Le défi des langues*" ("La lingva defio"), kiu estas iom psikanalizo de internacia komunikado, estis eldonita ĉe L'Harmattan (Parizo) en 1994. Li publikigis en Esperanto ok romanojn, plurajn novelarojn, poemaron kaj kantokasedon. Li publikigis diverslingve multajn artikolojn pri internacia kaj interkultura komunikado, kaj pri psikologio. Li aŭtoris aŭ kunaŭtoris tri franclingvajn librojn pri psikologiaj temoj.

Fonto: <http://claudepiron.free.fr/index.htm>


GERMAIN PIRLOT INFORMCELE

En la TTT-ejo de UEA aperis la plej nova listo - la jam 13-a - de Germain Pirlot pri Esperanto-kursoj oficiale organizataj en universitatoj kaj (samgradaj) altinstitutoj. Konsultebla ĉe la adreso: <http://uea.org/agadoj/instruado/universitatoj.html>. En la vendreda programo de Pola Radio (la 25-an de januaro) aŭdiĝis interparolo kun la kompilinto pri lia laboro, pri kiu li okupiĝas ekde la 1977-a jaro. Ĉe la adreso: <http://www.polskieradio.pl/eo/>

Barbara Pietrzak, UEA-estrarano pri informado, www.eventoj.hu

Ĝus mi dissendis ĝisdatigon de mia kompilado pri E-kursoj oficiale organizataj en universitatoj kaj altinstitutoj. En ĝi troviĝas diversaj sciigoj pri 67 kursoj en 24 landoj. Se tio interesas vin, mi plezure alsendos al vi tiun 22-paĝan dokumenton (Word). Kompilinto: gepir.apro@pandora.be Steenbakkersstraat 21, BE-8400 Oostende,

Germain Pirlot



BIRDINO (FRANCINE SPEBER) PRI SAKRAĴKONKURSO

Norvega Junularo Esperantista (NJE) invitis al konkurso pri sakraĵoj. La organizo volis pruvi ke malgraŭ la antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto la lingvo kapablas esprimi fiaĵojn.

La ĵurio konsistis el Jardar Eggesbø Abrahamsen (doktoro pri lingvistiko), Otto Prytz (akademiano kaj devene el la norda, plej sakrema parto de Norvegio) kaj Heming Welde Thorbjørnsen (prezidinto de TEJO).

Verdikto de la juĝkomisiono :

La 1a premio

La admono kombinas du tabuojn : lingvan tabuon pro la uzo de vulgara seksuma vorto, kaj socian tabuon pro tio ke la priskribita ago koncernas kombinon de homo kaj besto. Samtempe la admono vekas imagojn kiuj ne nur donas fortan impreson de doloro, sed ankaŭ aludas ke tute ne eblas plenumi la menciitan agon. Tiel la aspekto de prodolora humuro povas veki ridetojn se oni uzas la esprimon en la ĝusta situacio. Se la admono adresiĝas al virino, oni tuŝas ankaŭ tabuon kiu troviĝas en la pli antaŭjuĝaj rondoj, kio devas esti avantaĝo. Tipologie la esprimo similas al malnova sed senrilata admono de Sunnmøre kiu temas pri simila traktado de salikoko. La venkinta esprimo estas : **Fiku fratilon de erinaco.** (kontribuis *Etel Zavadlav, Kroatio*)

La 2a premio

La due plej bona esprimo estas, pro la pli rekta insulto, malpli humura admono ol la plej bona. Sed same kiel la plej bona ĝi havas kombinon de lingva tabuo kaj tabua insulto. La lingva tabuo de la due plej bona insulto rilatas al la uzo de vulgara vorto, kaj la tabua insulto temas pri la grandeco de la referencita korpoparto. La insulto taŭgas nur kontraŭ duono el la homaro, kaj tio iom malkonvenas kiel venkanta sakraĵo. Samtempe la aludita malgrandeco de la menciita tabua korpoparto estas nerekte esprimata, kio estas efika literatura metodo kiun ekspluatis precipe Bjørnstjerne Bjørnson, kvankam en aliaj kunteksto. **Serĉu vian kacon per pinĉilo.** (kontribuis *Etel Zavadlav, Kroatio*)

La 3a premio

La trie plej bona esprimo estas insulta, kvankam la vortoj uzataj ne estas aparte tabuaj. La insulto ne estas same forta kiom n-ro 2, sed la pitoreskeco de la vortumo najbaras al poezio, kion oni devas premii. **Vi estas pli delikata ol felo de fekaĵo.** (kontribuis *Manuel Pancorbo Castro, Hispanio*)

Aliajn 54 proponojn legu sur sama retejo.

<http://www.esperanto.no/nje/eo/konkurso.php>

Birdino

Ekspozicio pri Esperanto en la Eŭropa Parlamento

En la Eŭropa Parlamento en Bruselo la 30-an kaj 31-an de januaro videblas ekspozicio pri la temo "Esperanto kiel perilo de translimaj junularaj kontaktoj". La ekspozicio povis okazi pro subteno de Ljudmila Novak, slovena ano de la Eŭropa Parlamento. Ŝi mem lernis Esperanton en sia junaĝo, kaj plu simpatias al la lingvo, kvankam ŝi ne aktive parolas ĝin. La ekspozicion praktike organizis kaj financis Eŭropa Esperanto-Unio, kaj la inaŭguron ĉeestis Sean Ó Riain, prezidanto de EEU kaj irlanda diplomato, kiu antaŭ nelonge estis taskita direkti la retan sektion de la ĵus kreita irlandlingva tradukservo de la Eŭropa Komisiono.

La ekspozicio situas en angulo de unu el la vastegaj koridoroj de la parlamentejo, en konstruaĵo P.-H. Spaak, en la 2-a etaĝo, en Bruselo.

La origina temo de la planita ekspozicio estis *Minoritataj junuloj kiel ligilo en translimaj kontaktoj*, kaj fakte okazis konkurso pri eseoj, desegnaĵoj kaj simile inter lernejoj de ekstersloveniaj slovenlingvaj kaj sloveniaj dulingvaj lernejoj (interalie el Triesto kaj Klagenfurt), kies gajnintoj estis invititaj viziti Bruselon kaj la parlamentejon, kaj tie prezenti siajn verkojn.

Tamen, la patrono de la aranĝo, ano de la Eŭropa Parlamento Ljudmila Novak, kiu lernis Esperanton en sia junaĝo, kaj ankoraŭ komprenas Esperanton kaj simpatias al ĝi, akceptis ke oni aldonu duan parton, *Esperanto kiel perilo de translimaj junularaj kontaktoj*. Tiun parton organizis kaj financis EEU, kaj pli konkrete ĝia prezidanto Sean Ó Riain, irlanda diplomato antaŭ nelonge taskita direkti la retan sektion de la ĵus kreita irlandlingva tradukservo de la Eŭropa Komisiono, kaj Maja Tišljar, filino de Zlatko Tišljar, kune kun Flory Witdoeck el Oostende.

Kiam la ekspozicio estis inaŭgurita merkrede, Ljudmila Novak parolis slovene pri la du temoj kaj prezentis la premiitojn, sekvis mallonga resumo en la angla, iu junulo kantis, Sean Ó Riain prelegis mallonge pri Esperanto (komencinte per franca salutfrazo, li poste diris germane kelkajn dankvortojn al Ljudmila Novak kaj daŭrigis angle, en la "lingvo komprenata verŝajne de la plejmulto de la ĉeestantoj"), rebatante interalie la argumenton pri artefariteco per komparo al "provuba bebo", arte koncipita sed de tiam nature evoluinta al plene normala homo. Finis Flory Witdoeck per kantado de la Eŭropa Himno en Esperanto.

Poste Ó Riain ricevis gratulojn de la slovena ministro pri la medio, Janez Podobnik, kiu havis multajn demandojn pri Esperanto, kaj de direktoro en la Eŭropa Komisiono, Filip Majcen. Ambaŭ petis la tekston de la alparolo.

Estas ekspoziciataj premiitaj fotoj kaj desegnaĵoj el la konkurso, sed ankaŭ afiŝoj belaj kaj trafaj pri Esperanto kaj ties kultura valoro, desegnitaj de Danko Tišljar, fratino de Maja, kaj estas prezentata sur tablo kvardeko da libroj en kaj pri Esperanto, i.a. la nova lernolibro de Stano Marček en deko da lingvoj kaj la impone dika dudirekta vortaro Esperanta-Germana de Krause.

Raportis Angelos Tsirimokos <<http://www.liberafolio.org/2008/euekspo/>>

Vi ĉiuj scias, ke en multaj landoj la infanoj ne estas serioze edukataj; Barato mem havas grandan problemon de analfabeteco, kaj ankoraŭ ne havas vere funkciantan edukistemon por la tuta infanaro. Vi scias ankaŭ, ke la iamaj netuŝblululoj de la hindua kasta sistemo, la dalitoj (la malnovan vorton "parioj" oni nun rigardas kiel ofendan), ricevas hodiaŭ apartajn, kompensajn privilegiojn pro la konstitucio de Barato, kaj ke pro tio ofte venas en la universitatojn kaj en la laborejojn nove edukitaj homoj, kies malklera familio nesufiĉe ekipis ilin por funkciado en la malsimpla lingvaĵo de universitataj aŭ oficialaj libroj. Por ke la homaj rajtoj de nove edukataj infanoj aŭ de unuageneracie alfabetigitaj plenkreskuloj ĵetitaj en modernan laborejon estu garantiitaj, ne sufiĉas konservi la gepatran lingvon en la eduka sistemo. Ĉi tiuj klientoj bezonas novajn servojn.

Imagu mondon, en kiu vi, ial bezonanta klarigon de teksto malfacila por vi, povas prezenti vian tekston al tekstofaciliga komputila programo, kiu kapablas pritrakti la lingvon de via teksto. La programo devus povi preni viajn longajn frazojn kaj tranĉi ĝin en plurajn mallongajn frazojn. Ĝi devus povi preni viajn kompleksajn vortojn kaj samlingve traduki ĝin per vortoj simplaj. Por ke komputila programo iam komprenu kaj plifacigu por vi viajn tekstojn, ni devas hodiaŭ rigore verki novajn vortarojn de ĉiuj skribaj lingvoj – vortarojn, en kiuj la senco de ĉiu vorto havas ne nur fonetikan transskribon por indiki la elparolon de la vorto, sed ankaŭ semantikan transskribon, kiu diros al la komputilo la precizan senco de la vorto.

Nu, la Internacia fonetika alfabeto, lanĉita en la malfrua dekaŭa jarcento, pli-malpli sammomente kiel Esperanto, estas jam monde akceptita kaj uzata por la fonetika transskribado. Sed por la semantika transskribado de malfacilaj vortoj ankoraŭ ne ekzistas vaste uzata sistemo. Ni, kiuj uzas Esperanton, certe tuj vidas, ke nia lingvo, en kiu ni povas veturi de skrib/i, pere de skrib/il/o kaj skrib/il/ar/o, al skrib/il/ar/ej/o kaj skrib/il/ar/ej/ist/o, estas la plej ideala sistemo nun disponebla, per kiu la vortaristoj de ĉiuj lingvoj povas rigore formuli la senco de la vortoj.

Kompreneble, same kiel la Internacia fonetika alfabeto, bazita sur iu versio de la latina skribsistemo, bezonis ampleksigon por fariĝi uzebla kiel fakailo, tiel same ankaŭ la Esperanta vortprovizo en sia nuna formo ne estas tute sufiĉa por la komputila tasko de la semantika transskribado, kiun laŭ mi la elektronikaj vortaroj de la etnaj lingvoj devos doni al ĝi. Oni bezonas ampleksigi la Esperantan vortprovizon. Sed tiu ĉi ideo ne estas nova en la komputilaj aplikoj de nia lingvo. En la okdekaj jaroj, kiam la nederlanda firmo BSO funkciigis la projekton DLT (Distribuita lingvo-tradukado) sub la gvido de la inĝeniero Toon Witkam kaj la lingvisto Klaus Schubert, oni konsentis pliekzaktigi la esprimkapablojn de Esperanto per aldono de specifaj pronomoj kaj tabelvortoj. Certe io sama estas farebla, se ni volas al la tuta vortarista mondo vendi nian lingvon kiel taŭgan leksikan transskribilon de ĉiuj sencoj de ĉiaj vortoj.

Bonvolu atenti, ke ni proponas ne simple fakan ilon por uzo en elektronikaj vortaroj de ĉiuj lingvoj. Ni proponas tian ilon kaj tian uzon lige kun la observado de homaj rajtoj de senprivilegiaj homoj, kies komprenbezonoj ne estas plenumebaj en la nuna mondo pro la manko de sufiĉe multnombraj kaj sindediĉaj instruantoj. Nia tasko estas komprenigi al niaj kolegoj ĉie, ke la pedagogio, kiu fariĝas ĉiam pli elektronika, bezonas taŭgajn ilojn por servi al tiuj klientoj, kies lastatempa aŭ daŭranta socia malfeliĉo akutiĝas ilian bezonon por efika helpo.

Se la facileco de Esperanto povos servi al tiuj homoj, kiuj plej bezonas la simpligon de la tekstoj legotajn de ili por sia klariĝo aŭ laboro, tiam ni povos interrenkontigi nian facilan lingvon kun unu tre klara laborcelo en la nuntempa mondo.

Mi de longe aŭdas kritikojn, kiuj nepre havas veran bazon, pri la troa malfacileco de miaj diroj kaj skriboj. Mi tial de longe revas pri ilo, kiu tradukos miajn kaj alilulajn malfacilajn tekstojn en simplan lingvaĵon kompreneblan al ĉiuj. Eble pro tiu persona handikapo mia naskiĝis ĉe mi tiu ĉi revo. Sed eble ankaŭ aliaj, kiuj ne suferas pro mia handikapo, trovas la revon interesa kaj pripensinda.

Por fine reveni al la ĉefaj pensoj en tiu ĉi teksto, ni povas utile formuli unu demandon kaj pripense respondi ĝin. Kia aliro al la lingvistiko do kongruas kun la nuntempa tagordode Esperanto? Al tiu ĉi demando mia respondo estas jena. Ni estas komunumo interesita pri la homaj rajtoj. Ni foje reliefigas la lingvaj rajtojn; sed porefike labori por tiuj rajtoj ni devas multe pli zorge atenti la konceptan enhavon de la leksiko de ĉiu lingvo. Esperanton ni devus proponi kiel ilon porklarigi – precipe sed ne nur en komputilaj vortaroj – tiun leksikan enhavon. Tia ĉi propono estas historie kaj enhave kongrua kun la praktikoj de la vortaristoj rilate aliajn notad-sistemojn en la fonetiko kaj la fraza logiko.

Se pli detale rigardi tiujn punktojn – oni internacie akceptis kaj ĉie uzas por la fonetika transskribado la Internacian fonetikan alfabeton, naskiĝintan samepoke kiel Esperanto. Oni same akceptis kaj uzas por la matematika-logika formulado de la senco de frazoj la logikan simbolaron naskiĝintan en tiu samafina momento de la dekaŭa jarcento. Sed por la semantika transskribo de vortoj, por la rigora prezentado de la vortosencoj en vortaroj, oni ankoraŭ ne havas interkonsentitan glosilan sistemon. Ĉar ekzistas tiu breĉo, ni proponu la uzon de Esperantaj vortoj en la rolo de glosiloj en ĉiuj seriozaj, plenampleksaj vortaroj de la etnaj lingvoj. Se ni rigore konatigos la taŭgecon de Esperanto al tiu celo, ni povos akceptigi ĝin al la vortaristoj iom post iom, kaj Esperanto havos unu tute firmen niĉon.

Probal Dasgupta

La semantika transskriba uzo de Esperanto

Kiam ni kongresas, ni kutime revenigas al ni la vortojn de Zamenhof, ke kongresas ne A-nacianoj kun B-nacianoj, ne D-nacianoj kun E-nacianoj, sed homoj kun homoj. Sed atentu, ke ĝuste por akcepti nian transbaran homecon, ni ofte statistikas, kiom da kongresanoj venis el kiom da landoj – tiamaniere akcentante ĝuste la malsamecojn inter ni kaj ne la komunan homecon.

Atentu ankaŭ, ke nuntempe ne la diferencoj inter la nacioj ĉefe altiras la publikan diskuton kaj atenton, sed alispecaj diferencoj, ofte ene de nacioj. Por ke niaj laboroj por Esperanto kongruu kun tiu ĉi diskutata etoso ĉe la hodiaŭa monda publiko, laŭ mi, ni bezonas evoluigi en nia movado lingvistikan strategion.

Kial la lingvoscienco havu apartan rolon en la Esperanto-movado? Nu, ni ofte devas trakti ne simple kun la ekstera publiko, sed kun homoj, kiuj fidis al la spertuloj. Oni kutime pensas, ke la lingvosciencistoj estas kompetentaj formuli klerajn opiniojn pri Esperanto. Por ke la informiteco pri Esperanto fakte kresku en la lingvosciencaj rondo, ni devas mem evoluigi ian lingvosciencan strategion. Tion ni ankoraŭ ne faris. Kvankam estas ni lingvosciencistoj en la esperantista medio estas sufiĉe multnombraj, ni restas lojalaj al la respektivaj sciencaj skoloj kaj ne entreprenis aparte esperantistan reprensadon pri la lingvistiko. Oni bonvolu aŭskulti miajn vortojn en tiu kunteksto. Entrepreni tian reprensadon ne estas tasko, kiun la lingvistoj inter ni povas fari sen la helpo de aliaj en la Esperanta komunumo. Tial ni ege bezonas viajn reagojn al tia interveno, kiel la mia.

Mi komencas per skizo de mia vizio pri Esperanto, ene de kiu mi kadrigas miajn pensojn pri la lingvistiko. Se la Ligo de Nacioj adoptus Esperanton kiel mondan lingvon en 1922, la tiutempa etoso rolus kiel decida faktoro, kaj Esperanto funkcius kiel unuecigilo de la imperia tipo, pro kio hodiaŭ ni verŝajne manĝus ĉie Esperantaj kolbasojn en Esperantaj Makdonaldoj. Sed tio ne okazis, kaj nia komuna lingvo konservas la eblon agordi sin al novaj mondaj situacioj.

Mia propra kompreno pri la evoluo de la monda situacio ĝis nia tempo estas bazita sur jena iom simpligita bildo. La imperioj kaj la nacioj ekzistas de trege longe; sed nur en la pasintaj tricent jaroj ekis tiuj specife modernaj imperioj, el kiuj oni poste fazonis la modernajn naciojn. Hodiaŭ la projekto elfari el la imperia mapo modernajn naciojn estas pli-malpli finita; la naciismo plue ekzistas, tamen ne kiel ideo por fari ion novan, sed nur kiel neeksigita malnovaĵo. Post la dua mondmilito, ene de la modernaj nacioj la homoj starigis al si la novan projekton garantiila homajn rajtojn, individue, por ĉiuj popoloj. Atentu, tamen, ke ne estas eble politike atingi la individuon en ties konkreta unuopuleco. La individuo ekzistas en siaj rilatoj kun aliaj, kaj tiujn rilatojn nuntempe plej grave organizas la politikaj nacioj, kiujn mi nomas "regionoj". La politika procezo atingas la individuon laŭ mi nur pere de tiuj regionoj. Se Esperanto funkcii kiel interpersona lingvo, ĝi devas en nia tempo unuavice krei al si la rolon de interregiona lingvo, per kiu ni transiras la nuntempe gravajn dividlimojn inter la regionoj. Kio precize estas la regionoj en tiu moderna senco?

Geografie, regiono estas spaco ene de spaco. En la politika geografio de nia tempo, mi komprenas "regionon" kiel tian subkomunumon, kian la nacia ŝtato devas sociolite trakti kiel nacieron. Kompreneble la evidentaj geografiaj regionoj estas ĉi tiaj nacioj. Sed ankaŭ aliaj subkomunumoj, kun kiuj la nacio bezonas politike intertrakti, estas laŭ mia kompreno regionoj de la nacio. Alidire, ne nur la loĝantoj de unu distrikto aŭ de unu provinco, sed ankaŭ la virinoj de la tuta lando estas unu regiono de la nacia socio. La maljunuloj de la tuta nacio estas sammaniere alia regiono. La handikapuloj estas ankoraŭ alia; kaj tiel plu. Ankaŭ en la geografio oni devas atenti ne tro sklave sekvi la erojn de la landmapo: la kamparanoj kiel tuto estas politika regiono de ĉiu nacio, kvankam la kamparaj lokoj povas ne konsistigi kune unu klare desegneblan landeron.

Same kiel la formoj de politika organiziĝo aperis unu post alia en la moderna epoko – la imperioj, la nacioj, la homaj rajtoj – tiel same la lingvistikaj kompreno sinsekve ŝanĝiĝis. Tiuj ŝanĝiĝoj estis intime ligitaj al la sociopolitika medio.

En la imperia tempo, ni ekhavis la sciencan de kompara kaj historia lingvistiko. Ĝi naskiĝis kiel rigora scienco en mia urbo, Kolkato, en la 2a de februaro 1786, kiam William Jones, prelegante en la Azia Societo, formulis la ideon, ke la sanskrita, la helena, la latina, la malnovpersa ktp estis filinoj de iu prahindeŭropa lingvo. Post la leviĝo de la sendependaj nacioj, la lingvistiko evoluis al la strukturismo de Ferdinand de Saussure. Hodiaŭ, en la epoko de la homaj rajtoj, ni havas lingvistikon de la individua homa menso – la generan gramatikon de Noam Chomsky kaj la tiel nomatan "kognan" lingvistikon de George Lakoff.

Esperanto trovas naturan lokon en la prilingvaj kompreno de nia tempo, se ni agordos niajn laborojn al la sociaj organiziĝoj hodiaŭaj, kaj se ni atentos en tiu laboro la bezonojn kaj kapablojn de la nova lingvistiko. Ĉu por iu interregiona punta celo ni povas relative tuje proponi kaj akceptigi Esperanton? Se jes, tia tereno bezonas nian seriozan atenton.

Laŭ mia takso, unu tia niĉo, kiun Esperanto povas relative baldaŭ okupi, ekzistas en la leksikografio, do en la verkado de vortaroj. Por niatempigi la ideon, necesas ĝin prezenti enkadre de la homaj rajtoj.



Prelego de Probal Dasgupta, 14a Februaro 2008 5a Azia Kongreso de Esperanto, Bengaluro, Barato, 11-15 feb 2008 Resuma mallongigo

Ĉu Esperanton parolas iuj lingvistoj? Jes. Ĉu la Esperanta movado havas strategion rilate al la lingvistiko? Ne; niaj lingvistoj funkcias en diversaj lingvistikaj skoloj senrilate al Esperanto. Kia aliro al la lingvistiko kongruas kun la nuntempa tagordo de Esperanto? Ni estas komunumo interesita pri la homaj rajtoj. Ni foje reliefigas la lingvajn rajtojn; sed por efike labori por tiuj rajtoj ni devas multe pli zorge atenti la konceptan enhavon de la leksiko de ĉiu lingvo. Esperanton ni devus proponi kiel ilon por klarigi tiun leksikan enhavon. Nuntempe, oni internacie akceptis kaj uzas por la fonetika transskribado la Internacian fonetikan alfabeton naskiĝintan samepoke kiel Esperanto. Oni same akceptis kaj uzas por la matematika-logika formulado de la senco de frazoj la logikan simbolaron naskiĝintan en tiu sama fina momento de la deknaŭa jarcento. Sed por la semantika transskribo de vortoj, por la rigora prezentado de la vortosepcoj en vortaroj, oni ankoraŭ ne havas interkonsentitan glosilan sistemon. Ĉar ekzistas tiu breĉo, ni proponu la uzon de Esperantaj vortoj en la rolo de glosiloj en ĉiuj seriozaj, plenamplaksaj vortaroj de la etnaj lingvoj. Se ni rigore konatigos la taŭgecon de Esperanto al tiu celo, ni povos akceptigi ĝin al la vortaristoj iom post iom, kaj Esperanto havos unu tute firman niĉon.

Kompleta teksto en paĝoj 8 kaj 9

Foto supre: staras P.V.RANGA, de maldekstre dekstren HORI Jasuo, LEE Jung-Kee, Probal DASGUPTA, Abdul SALAM, Tran Quan Ngoc. Foto sube: La redaktoro kaj la preleginto manpremas en Bengalura Kongreso.



KIE ESPERANTUMI BALDAŬ

1-5. majo 9-a Meksika Esperanto-Kongreso en urbo Aguascalientes. Inf: Meksika Esperanto-Instituto, Vicente Valdes Bejarano direktoro, kongreso@webmei.org, fakso: 52 449 194 4288

1-11. majo 20-a Esperanto-festivalo "Aroma Jalto", Ukrainio. Inf.: p/k35, Kijiv-133, UA-01133, Ukrainio. tel.h.+380-44-2851701, tel. m.+380674403172; rete: volodomir@ukr.net

1. majo - 15 oktobro Someraj Esperanto-Ripozoj ĉe Nigra Maro, Bulgario. Inf: Burgas, kv. Krajmorie, str. Cernomorka 9, Bulgario. Tel.: +359-(0)56/89-00-10, GSM 359-(0)877-46-41-88. rete: modest@abv.bg

2-4. majo Staĝo pri parolata esperanto en lorena vilaĝo Vigy apud Metz. Inf: tel.: Tel.: +33(0)3 82 53 25 47, rete: esperanto-thionville@laposte.net

5-9. majo Interkultura Semajno kun prelegoj pri interkulturaj temoj, diskutoj, muziko en la germana (per ICH) Inf: ICH, Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg/Harz, Grubenhagenstr.6. Tel: +49/(0)5521-5983, rete: esperanto-zentrum@web.de

8-12. majo Komuna kongreso de francaj asocioj kun la temo "Lingvoj kaj kulturoj en Mediteraneo" en Martigues apud Marseille. Inf.: mcerisav@gmail.fr

9-11. majo Brita Kongreso de Esperanto en Southport, Britio. Vizitu la ĉarman britan banurbon proksiman al Liverpolo, eŭropa kultur-urbo 2008. Inf: Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Staffordshire, ST12 9DE, Britio: Tel: +44-(0)1782-372141 rete: eab@esperanto-gb-org

9-12. majo 85-a Germana Esperanto-Kongreso en Essen. Temo: Malkovru viajn antaŭjuĝojn. Inf.: Christian Darbellay, Esperanto-Kiel, Kaiserstr. 39, DE-24143 Kiel, Tel. +49-431-737788, Esperanto-Kiel@gmx.de

15-18. majo Berlina Arbara Renkontiĝo, Printempa BARo 2008 en Bad Münden inter Hannover kaj Hameln, Germanio. En la arbaro, tial ideala por familioj kun etaj infanoj. Inf.: Andi Münchow, Oberstraße 15, DE-30167 Hannover, Germanio. Inf: [DL8oap\(ĉe\)gmx.net](mailto:DL8oap(ĉe)gmx.net)

17-24. majo 60-a Kongreso de Internacia Fervoja Esperanto-Federacio en Poznano, Pollando. Inf: Dom Kultury "Kolejarz" al. Niepodległości 8A, PL-61-875 Poznań, Pollando. Tel.: +48-601703231, fakso: +48-61-6331595, rete: pefa@op.pl

24-28. majo Postkongreso de la 60-a Kongreso de IFEF en Malborl, Białystok, Pollando. Inf: Dom Kultury "Kolejarz" al. Niepodległości 8A, PL-61-875 Poznań, Pollando. Tel.: +48-601703231, fakso: +48-61-6331595, rete: pefa@op.pl

26-30. majo Tutmonda kongreso de esperantistoj-jurnalistoj - en Vilnius, Litovio. Temo: "Internacia interkultura komunikado: ĵurnalismo kaj Esperanto". Inf: Litova Esperanto-Asocio, pk 167, LT-44287 Kaunas, Litovio. - Telefono (portebla): +370-687-12219, fakso +370-37-228616, rete: litova.ea@mail.lt

29. majo - 1. junio Internacia Mara Esperanta Renkontiĝo (IMER) en Krajmorie, Bulgario. Temo: "Originala Esperanto-literaturo", lekcioj, debatoj, distraj vesperoj, ekskursoj. Inf: Georgi Mihalkov, BG-1229 Sofio, jx. k. Nadejxda V, bl. 529, vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario, tel: (02) 934-42-55, posxtelfono: + 359 0889-137-555, rete: modest@abv.bg

1-7. junio Turismo, kulturo, historio - internacia esperanto-arango en Carevo (ĉe Nigra Maro, Bulgario). Inf: ing. Boris Vasilev Gaĝanov, ul. Petar Janev 21, BG-4600 Velingrad. tel.: +359-35954204, poŝtel. +359898676270, rete: gadzhanov_b@abv.bg

1-10. junio Internaciaj Esperanto-tagnoktoj, Ripozejo "Raketa" Tarhankut ĉe la Nigra Maro, nord-okcidenta angulo de Krimeo, Ukrainio. Temo: Ni kunas (rusoj kaj Ukrainanoj en por ĉiuj aliaj senviza Ukrainio). Inf.: espero@valta.krimea.ua

6-9. junio 103-a Skota Kongreso de Esperanto en Invershin Hotel, Invershin, Sutherland, Skotlando. Inf. David Hannah, Tigh na Cnoc, Ardgay Hill, Ardgay, Sutherland IV24 3DH. Tel. +44(0)1863766061, rete: David Hannah

10-18. junio 30a Cebalta Esperantista Printempo en Mielno, 12 km de Koszalin. Jubilea CEP kun riĉa kaj varia E-programo. (PL). Inf. Pola Esperanto-Asocio, Filio en Koszalin, poŝtkesto 30, PL-75-016 Koszalin-1, Pollando. CEP-organizanto: Czeslaw Baranowski Telefono: +48(0)503-417-825

23-27. junio Esperanto-kursoj en Popola Instituto de Valamo, Heinävesi, Finnlando. Ĉiuj kursoniveletoj, kursoj el la tuta mondo. Instruisto Atilio Orellana Rojas, kursogvidanto Tiina Oittinen. Inf.: Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, Finnlando. Rete: eafsekretario@esperanto.fi

26. junio - 2. julio FREŜO - Frusomera Renkontiĝo Esperanta Ŝokanta Olsĥinanojn; en Olsĥino (Olsztyn), Pollando; Reveno al fama antaŭ kelkaj jaroj renkontiĝo kun kvizoj kun valoraj monpremioj; Inf: Marian ZDANKOWSKI, PL-10-343 Olsztyn, Limanowskiego 36/3, Pollando; avolamer@ols.vectranet.pl; Skype: marianzdankowski

29. junio - 12. julio Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, Ĉeĥio. Ĉiutaga antaŭtagmeza laŭleakta instruado de lingvo. Inf.: podhradska@volny.cz

3-6. julio 67-a Hispana Kongreso de Esperanto en la bela kaj historia urbo Cuenca, Hispanio. Inf: alejandro.pareja@gmail.com

5-12. julio BET-44, 44-a Baltiaj Esperanto-Tagoj en Ventspils, Latvio. Inf.: Latvia Esperanto-Asocio, p.k. 150, LV-1050, Riga, Latvio. Rete: margarita.zelve@gmail.com, telefono: +371-26407174 (Margarita Zelve), +371-67383461, +371-28486628 (Biruta Rozenfelde)

7-11. julio Biblia Semajno en ICH/Herzbergo (aliĝo ĉe pastro Eichkorn). Inf: ICH, Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg/Harz, Grubenhagenstr.6. Tel: +49/(0)5521-5983, rete: esperanto-zentrum@web.de

11-14. julio 56-a ELNA-Kongreso, Montrealo, Kanado. Inf: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530, Usono. Rete: elna@esperanto-usa.org

11-18. julio 7-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto en Montrealo, Kanado. Inf: TAKE-EŠK, 6358-a, rue de Bordeaux, Montréal, Québec, Kanado H2G 2R8 informo@take7.ca

11-19. julio Kulturturisma semajno UK-antaŭkongreso en Herzberg - la Esperanto-urbo. Inf: ICH, Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg/Harz, Grubenhagenstr.6. Tel: +49/(0)5521-5983, rete: esperanto-zentrum@web.de

12. julio Festivalo pri fiŝista supo en urbo Baja, Hungario. Popolfesto kaj kuir-konkurso de fiŝista supo - kun esperantista partopreno! Inf: Székely Csaba bajai@eposta.hu, tel: +36-30-3032386 kaj +36-70-3336111

12-18. julio Internacia Esperanto-Konferenco 2008. La temo: Fernando de Diego - la vivo kaj verkoj. Elekto de OSIEK-premio okazos en Nova Gorica, Slovenio. Inf.: rete: eric@laubacher.fr aŭ ed.borsboom@versatel.nl

12-19. julio KEF (Kultura Esperanto-Festivalo) okazos en la ĉarmega urbo de Hamlet (almenaŭ de lia kastelo): Helsingør. Inf.: rete: kef9@tejo.org

12-19. julio 3-a Internacia Konferenco de Naturkuraca Asocio en Herzberg, Germanio. Temo: "Herbokuracado en Oriento kaj Okcidento". Inf.: s-ro Harald Schicke, Schoolbrink 12, DE-27383 Hatzwege, Germanio, Tel. +49-(0)4263-94087, Fakso: +49-(0)4263-94088, Rete: MZVerlag@web.de aŭ INA: ina-asocio@web.de

13-18. julio 16-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso en Krakovo, Pollando. Inf.: Zakład Opieki Zdrowotnej Ośrodek UMEA Shinoda-Kuracejo, os. Albertyńskie 1-2., PL-31-851 Kraków, Pollando. Rete: umea@interia.pl

13-26. julio Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, Ĉeĥio. Ĉiutaga antaŭtagmeza laŭleakta instruado de lingvo. Inf.: podhradska@volny.cz

15-18. julio UK-Antaŭkongreso en Herzberg - Esperanto-urbo, Germanio

19-26. julio 93-a Universala Kongreso de Esperanto, UK-2008, en Rotterdam, Nederlando. Inf: UEA, Nieuwe Binnenweg 193, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel: +31-10-4361044, rete: info@uea.org

19-26. julio IJK, 39a Internacia Infana Kongreseto, en Oostvoorne apud Rotterdam, Nederlando. Inf: Bert SCHUMANN, 9 rue du Couradin, FR-35510 Cesson-Sévigné, Francujo. Rete: bertox@free.fr

22-28. julio Itala Kongreso de Esperanto kaj Konferenco de Eŭropa Esperanto-Unio pri la temo: "Estonto de la Ideo pri Eŭropa Identeco" en Grosseto, Italio. Inf.: grosseto2008@esperanto.it

26. julio - 2. aŭgusto IJK, Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Szombathely, Hungario. Inf: LKK de IJK 2008, HU-1675 Budapest, Pf. 87, tel./fakso: +36-1-2828885, rete: hej@eszperanto.hu (atentu pri la hungara skribmaniero de "eszperanto", ĉe la retadreso)

27. julio - 09. aŭgusto Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, Ĉeĥio. Ĉiutaga antaŭtagmeza laŭleakta instruado de lingvo. Inf.: podhradska@volny.cz

28. julio - 4. aŭgusto Kristana Kongreso, 58-a Kongreso de KELI en hotelo Esperanto en Pribylina, Slovakio. Inf: Pavel Polnický